


LA JUNIA VIVO



MONATA 'ORGANO' DE „TUTMONDA JUNULAR-ORGANIZO”

REDAKCIO : E. VAN VEENENDAAL-BOUWES, LIMMEN NH. NEDERLANDO • ADMINISTRACIO : T.J.O. CENTRO WESTGRAFTDIJK NH. NEDERLANDO. ĜIRONO 382383 • JARABONO 1.50 NED. GULDENO ĀU EGALVALORO

PROF. OTTO HAHN: STATPERFIDULO KAJ MONDSAVINTO.

Estis atendinde, ke inter la gajnintoj de la nobelpremioj ĉifoje estis unu aŭ pli, kiuj esploris speciale sur la tereno de la atom-energio. Kaj efektive, germano kaj aŭstro ricevis la altan distingon pro siaj gravaj eltrovoj sur ĉi tiu tereno.

La eltrovo de la atom-energio estas tiom neordinare grava por la homaro, ke ni apenaŭ povas kompreni, kien ĝi kondukos. Nur tion ni klare vidas: la invento povos liberigi la homaron de multe da peza, malsaniga kaj malagrabra laboro. Ĝi povas signifi la komenciĝon de nova epoko en la evoluo de la homaro. Sed ni ĉiuj tre bone scias, ke tiu atom-energio ankaŭ povas esti uzata por detruji tutajn landojn, kaj por pereigi milionojn da homoj.

Pri la specialaj meritoj de Otto Hahn sur la tereno de la hemio ni scias nenion. Por prijuĝi tion oni mem devus esti ĥemiisto. Sed ĉiu normale konscia homo povas kompreni kian altmoralan agon plenumis ĉi tiu viro.

Li estis germano. Li posedis la ilon por deturni la teruran malvenkon de sia lando. Trifraza letereto al Hitler, komunikanta ke li trovis la atombombon, kaj ĉiuj ajn rimedoj estus je lia dispono. Li ricevus la plej altajn distingojn. La tuta germana gazetaro laŭdus lin, kaj li estus honorata kiel granda patrioto.

Kaj plej verŝajne Eŭropo tute detruigus.

Sed Hahn silentis pri la rezultatoj de sia scienca laboro. Li elmontris nenion. Li rigardis la ĉiam pli ne-eviteblan detruigon de

la germanaj armeoj; Italujo venkita, Francujo liberigita; li vidis la amerikanojn transiri la Rejnjon; unu germana urbo post la alia estis bombardata; la rusoj el la oriento kaj la anglo-amerikanoj pli kaj pli alproksimiĝis Berlinon, kaj fine enfermis ĝin en fera ringo. Sed li silentis.

Se iam homo perfidis sian patrujon en plej granda mizero, estis Otto Hahn. Sed — se iam viro pro tia ago meritas la estimon kaj admiron de ĉiuj sinceraj homoj, estas tiu germana sciencisto. Li ne estas ŝtono, sed viro, kun homaj kortuŝoj kaj sentoj. Preskaŭ ne eblas, ke li ne konis internan batalon, ke natura kaj instruita patriotismo ne de temp' al tempo perfortis lin, kaj dubigis, ĉu tio, kion li faris, estas permesata, ke li kurbiĝis sub la turmentego. Sed li venkis la atakojn de malforteco. Li imagis al si, kio okazus, se li ankoraŭ lastmomente detirus la venkon de la alianco. — Lia buŝo restis fermita. Li faris la oferadon.

Feliĉe multaj germanoj deziris la malvenkon de sia lando. Estis komunistoj, kiuj transiris al la rusoj, antimilitistoj, kiuj ricevis la kuglon pro sia militrifuzo; piuloj en la koncentrigejoj preĝis por la germana malvenko. Ilies memoron ni honoras, sed tutalie ni honoru la scienciston, kiu per heroa silentado deturnis de la mondo la fatalon de germana venko.

N. Kool (West-Grafdijk).

libere rakontita laŭ artikolo de H. Roland Holst.

RENKONTIĜO EN GERMANUJO.

Mi iras tra la urbo. En la stratoj de Dresdeno multaj homoj, germanoj kaj eksterlandanoj. Ofte tre mizeraj figuroj, la eksterlandanoj, ne bone vestitaj, kiam ili jam trapasis koncentrigejon. Sed tamen amikoj. Tiel mi sentas min ĉiam, kiel amiko inter amikoj. Rusoj, poloj, francoj, litovoj, italoj, serboj, ktp. Min tre interesis tiuj strangaj personoj, kaj ĉiun okazon mi uzas por babili kun ili. Estas tiom interese aŭdi la fremdajn akcentojn, kiam eksterlandano parolas germane. Kaj kiom ĝoje mi eklernas la rusan lingvon. Jam multajn geamikojn mi havas inter la „Ost-Arbeiter” (Orient-laboristoj). Mia tuta simpatio iras al ili. Kial? Mi ne scias. Fortirataj de la „verda policistaro” el la gepatra domo, ili nun devas laboregi tie ĉi. Ankaŭ mi estis fortirata de mia familio, sed mi havis tri tagojn por kolekti miajn vestojn kaj prepari ĉion. Mi povas libere iri en- kaj eĉ ekster la urbo, kien mi volas, sed ili,

kompatindaj homidoj, tuj post la laboro devas iri en siajn resta-dejojn (Lager). Nur dimanĉe ili povas promeni, sed estas kon-damnitaj porti OST sur la brusto.

Malfrue jam mi venas el la popollernejo (vesperkursoj por ling-voj, ktp). Sur ponto, en la lumo de elektraĵ lampoj laboras grupo da „Ost-Arbeiter” gardata de du soldatoj. Oni devas eltiri strat-ŝtonojn, por ripari tramvojon. Mi ŝteliras al ili, kaj ekparolas en malluma angulo: „Dobrii wetŝer” (Bonan vesperon). Li strange-rigardas min kaj flustras: „Estu singarda! Tuj la mastro arestos vin!”. Mi faras, kvazaŭ mi estus kunlaboranto, prenas ŝtonon kaj ĵetas ĝin ĉe la aliaj.

Li: „De kie vi venas?” — Mi: „El Holando, kaj vi?” — Li: „Poltava”.

Mi: „Jes, mi legis pri Poltava en la gazetoj.” — Li: „Diru ka-marado, kie estas la fronto? Ĉu nia armeo baldaŭ liberigos nin?”

Mi: „Estu pacienca, libereco venkos.” — Li (kun ŝtelrigardo al la gardisto, kiu sin turnis): „Ho kamarado, kiom laca mi estas. Kaj la liberiĝo estas ankoraŭ tiel malproksima!”

Subite venas la gardisto. Mi prenas buterpanon el mia poŝo: „Jen, estu kuraĝa kaj pacienca! La liberiĝo venos, ankaŭ por vi!” Post tiuj vortoj mi forkuras.

La klara stel-vespero iom kvietigas min. „..... la liberiĝo estas ankoraŭ tiel malproksima.....” tiuj vortoj tranĉis min tra la animon. „..... tiel malproksima.....!” Miaj okuloj supren-rigardas, ĉielen, malproksima, jes, sed ĝi venos por ĉiuj bonaj homoj; ĝi marŝas, nenio ĝin haltigos; nenio, amiko. Ĉu vi aŭdas, vi ĉiuj, fratoj miaj? Liberaj ni estos! — Libereco kaj paco, kiaj trezoroj! Gardu ilin, ho, gardu ilin!

Wim v. d. Hoff (West-Graaftdijk).

LA FAMILIO ZAMENHOF EN VARSOVIO.

Ni nun definitive scias ke de la familio de d-ro Zamenhof nur vivas S.ino Wanda Zamenhof, edzino de Adam Z, kaj sia 15-jara filo Ludoviko (nepo de d.ro Z). Adam Z., filo de d.ro Z., estis mortigata en germana malliberejo. — Lidja Zamenhof (filino de nia majstro) estas bruligita en mortigejo por hebreoj en Treblinka, loko inter Varsovio kaj Bialystoko. — S.ro Arszemuk (Polujo) skribis: „Mi venis al F.ino Zamenhof, kaj proponis al ŝi kaŝi sin ĉe mia familio. Sed tiu nobla virino rifuzis savi sin, dirante, ke mi kun mia familio povus perdi niajn vivojn, ĉar kiu kaŝas hebreon, tiu pereos mem kune kun trovita hebreo.

MIA TAGLIBRO PRI LA DUA INTERNACIA JUNULAR- KUNVENO EN BELGUJO (Tervuren, 7-14 Aŭg. '39).

(la lastan tagon de la TJO-kunveno).

Posttagmeze ni iras al Hoeilaart, viziti la vinberujojn. Fremda sinjoro gvidas nin tra ĝis nun nekonata parto de la arbaro: Kap-cienen Bosch. Laŭlonge marĉoj, kampoj, trans malnovaj pontetoj, ni brak' en brako promenas. Kiom malgrandaj ni estas inter tiaj altaj arboj! Mirinde, ili ĉiu estas rektaj kiel grandegaj alumetoj. Ni ĝuas la belecon de l'naturu. Mi plu ne rememoras kial, sed mi promenas sola. La aliaj pasas, pasas, mi rimarkas, ke mi preskaŭ estas la lasta, de la tuta grupo. Strangaj ideoj denove kaptas min. Denove la adiaŭo ombrumas mian cerbon. Mi preskaŭ ne povas kredi, ke morgaŭ je ĉi tiu horo la tuta semajno jam pasis, ke disigitaj ni denove sekvos la vivovojojn. Morgaŭ staros la materia vivo antaŭ ni kun ĝiaj zorgoj, ĉagrenoj, minacoj. Nun mi jam povas imagi, ke mi povos deziri ĉeesti alian junularkunvenon! Sed jaro devos forpasi, kaj kio ne okazos dume! La grupo haltas ĉe la rando de la arbaro. Mi retrovas la aliajn. Feliĉe, ĉar mi certe iĝus pesimisma. Ni sidiĝas en la herbo. Malsupre kuŝas la vilaĝo Hoeilaert.

Vespere ni iras al la festsalono Lastfoje ni eniras ĝin. En mia cerbo nur ŝvebas la vorteto: lasta, lasta Nia grupo sidas kune. S.ro Kryt aperas sur la scenejo. Li rememorigas al ni, ke la lasta vespero komenciĝas. La grupo el Koedyk denove dancas. La danco „Interkonatiĝo” ege plaĉas al mi. Jen estas nia angla kantistino. Ŝi kantas „Donkey Serenade”. Ŝi ree devas kanti. Valson ŝi kantas. Post la angla fraŭlino aperas angla knabo: li dancas, kaj dum la dancado li lerte faras kelkajn akrobataĵojn. S.ro Kryt demandas, ĉu neniu deziras diri kelkajn vortojn, sed neniu ekstaras. Subite S.ro Symes aperas. Li rakontas historion. Liaj gestoj tute harmonias kun la vortoj. S.ro Kryt denove aperas. Mi nur timas, ke li fermos la vesperon. Sed ne, feliĉe ne. Ni komune kantas nian marŝkanton kaj „La Espero”. La kantado komenciĝas, sed ne eblas al mi kanti kun la aliaj. Kiom malplena mi sentas min. — Jam oni kantas „La Espero”. Mi ne rajtas pensi pri la adiaŭo, aŭ mi denove malfortiĝos. La vespero ankoraŭ ne finiĝis. La anglaj fraŭlinoj fermos la vesperon. Ili fermas la lastan vesperon, kaj kantas al ni: „Ĝis revido, ĝis revido.” Nur mi plu ne estas mi mem. Aŭdante „Ĝis revido ĝis revido” ŝajnas al mi, kvazaŭ la tero malaperas de sub mi. Neniam en mia vivo adiaŭo kortuŝis.

min tiel profunde. Malforta mi estas ege malforta, sed kontraŭ tio ne eblas fari ion. Poste mi trovis, ke estas iomete infane, ke junulo ploras, sed mi esperas, karaj geamikoj, ke vi komprenas mian tiaman animstaton, ĉar ankaŭ vi certe sentis ion ĉagrenigan, ion kortuŝegan en via koro. — La lasta vespero finiĝis. Ĉie mi aŭdas adiaŭajn vortojn. „Ĝis revido” resonas en la salono. — Sola mi eliras

Roger Cosijns.

LA INTERNACIA TURISTA ASOCIO „LA NATURAMIKOJ” KAJ ESPERANTO.

Same kiel nia kara Esperanto-movado ankaŭ la turista asocio „La Naturamikoj” multe suferis sub la battoj de la milito. Sed baldaŭ venos nova tago. Ĉie regas nova vivo kaj entuziasmo por la bonaj, pacaj kaj kulturaj celoj. La Esperantistoj kolektiĝas sub la verda standardo kaj la naturamikoj, kiuj memoros en tiu nova jaro la 40-jaran datrevenon de la fondo de la unua svislanda turista grupo, preparas sin rekonstrui la naturamikan internacian movadon. La svislanda sekcio nombras nun ĉirkaŭ 12000 membrojn.

Antaŭ 50 jaraĵoj en Vieno kunvenis 37 kamaradoj kun la celo, vekiĝi ĉe la laboristaro de la fabrikoj kaj kontoroj en la grandurbo, la ĝojon je la naturo kaj la spiriton de vere amika komuneco. Baldaŭ la bela afero disvastiĝis en Aŭstrujo kaj ne haltis ĉe la landlimoj.

Antaŭ la milito ĝi kreskis al grave internacia organizo, al kiu apartenis 11 landaj sekcioj, kiuj jam posedis centojn da naturamikaj hejmoj, situantaj ĉu en bela, rava kampara ĉirkaŭaĵo, ĉu en alta montaro sur alpoj proksime de rokoj kaj eterna neĝo. Parte ili estis konstruitaj en komuna laboro dum libertempo kaj parte oni aĉetis ilin per la ŝparitaj kotizetoj. La hejmoj servis kiel kunvenejo por la naturamikoj dum libertempo. Tie ili trovis lokon por ripozo, ĝojan, seriozan, amikan rondon kaj bonvenigan gastamon.

Rakontoj pri vojaĝoj kaj fremdaj, frataj popoloj ĉiam estis ŝatataj temoj, same kiel la natursciencaj klarigoj kaj paroladoj, por akiri pli seriozan konon pri la naturo kaj profundan amon al ĝi. Sed ankaŭ kun ĝojo estis konstateble, ke ankaŭ Esperanto, la lingvo internacia, tiris la intereson de la vojaĝema anaro. Kelkaj faktoj pruvas tion: Belga naturamiko iam raportis: „Kurso por

Esperanto akiris multan intereson." En Svislando oni nomigis naturamikan hejmon situanta en la valo Villand: „Frateco". En la jugoslava gazeto „Suda Stelo" aperis longa artikolo pri la tiea laborista turista movado kaj laŭ informo de hungara kamarado la esperantistoj kaj naturamikoj bone kunlaboris en sia lando. —

Kaj nun, post tiu longa interrompo, kaŭzita de la mizerega interhoma batalo, ni je la komenco de la nova jaro 1946a reprenu la laboron, kaj daŭrigu la fidelan, pioniran agadon de la geamikoj por la popolinterliga lingvo Esperanto en nia kara naturamika movado ĝis la veno de la frata kaj justa spirito, kiu certigas la mondpacon.

Karaj geamikoj, la unua tasko nun estas propagandi per interesaj artikoloj el la Esperanto-movado en la naturamikaj gazetoj. Jam aperis en la decembre numero „Berg frei" artikoleto kaj ĵus alvenis la bele ilustrita revueto „Der Naturfreund" kun alvoko en ĝi por Esperanto. Ni daŭrigu!!! Montru al la Centra Komitato de la turista movado internacia, kiu havas la sidejon en Zürich, ke Esperanto vivas per multaj salutleteroj el la tuta mondo okaze de la duobla datreveno de la naturamika movado.

Por certigi bonan sukceson la amikoj estas petataj represi kaj traduki la artikolon kaj sendi la leterojn kaj gazetojn destinitajn al la naturamika centra komitato, al S-ro Walter Kobelt, Thalerstr. 340, Rheineck (Svislando), kiu transsendos la korespondadojn al la sekretario kaj respondos kaj informos laŭ ebleco pri la evoluo.

Walter Kobelt.

NIA TUTMONDA FAMILIO

..... Malmulte estas atendata ĉi tie ĉar Esperanto ne ĝuas liberon.

La Esperantistaj grupoj estas malpermesataj de l'tempo de la civila hispana milito.

Nia registaro, kiel certe vi jam scias, estas naciema. Tial ĝi ne povas permesi internaciaĵojn. Kiam la polico fermis niajn societojn la esperantistoj disiĝis. Iom post iom kelkaj pli kuraĝaj varbis novajn elementojn, private instruis esperanton al ili kaj organizis malgrandajn rondojn. Hodiaŭ la rondoj estas jam multaj tra la lando kaj estas interligitaj per korespondiloj. Mia rondo fondis Libro-servon, kies celo estas malplikostigi la prezojn de la esperantaj libroj, ebligante al la malriĉaj samideanoj interrilatiĝi kun nia literaturo kaj posedi esperantajn librojn. Ĝi ankaŭ eldonis kaj gvidas Perletera Esperanto-kurson, kiu plensukcese instruas nian lingvon al multaj lernantoj tra la lando.

Oni okazigas promenadojn, ekskursojn, vizitojn al muzeoj, ktp. ĉiam celante praktiki la interparoladon kaj varbadon.

Lisbono (Port).

Antaŭhieraŭ mi partoprenis ekskurson de haĝaj gesamideanoj al Rotterdam, kie ni sub gvidado de Rotterdamaj gesamideanoj vizitis la Mozan Tunelon. Ĉeestis la ekskurson proksimume 100 gemembroj de la laboristaj, neŭtralaj, katolikaj kaj kristanaj grupoj de Hago kaj Rotterdamo; do bela ekzemplo de kunlaborado.

Por novembro la kunlaborantaj Esperanto-organizadoj de Hago projektas impresan propagandkunvenon en unu el la salonoj ĉe Binnenhof; mi esperas, ke tiu aranĝo bone sukcesos.

Scheveningen. Th. Jung.

La nova Komerca Lernejo enkondukas esperanton. Tio estas deŝ pli rimarkinda, ĉar antaŭ 6 monatoj la lernejo enkondukis la instruadon de basic-angla lingvo, sed poste konvinkigis pri la netaŭgeco de tiu projekto.

Samideanoj, kiuj emas bonvolu skribi poŝtkartan gratulon al D-ro Leo Scherman, Neue Handelschule Bern, Wallgasse 4, Bern.

La Internacia Naturamika Movado eldonos ekde 1946 kotizmarkojn por la membroj en Esperanto.

Se estos loko, mi skribos kelkajn liniojn pri via agado en la Esp. anguleto.

Ni fondis Esperanto-grupon en Rheineck.

Svisujo. Walter Kobelt.

Mi gvidas Esperanto-kurson por nia unueco, kaj baldaŭ gvidos alian por la sekcio de ANJV (Generala Ned. Junular-Ligo). La TJO-anoj havos la rajton partopreni en ĉiuj kursoj de la Junular-Popul-Universitato de la ANJV, krom tio ili povos partopreni en la kursoj por popol-dancado kaj sporto (gimnastiko, ktp). Ĉi tion ni interkonsentis kun la loka sekcio de ANJV, mi interkontaktas kun ilia ĉefestraro pri landa kunlaborado.

Hilversum (Ned.), H. UITENBOGAARD.

EL „ORIGINALA VERKARO”.

Ĉu lingvo internacia estas bezona? Tiu ĉi demando per sia naiveco elvokos ridon ĉe la estontaj generacioj, tiel same kiel niaj samtempuloj ekridus ekzemple ĉe la demando „ĉu poŝto estas bezona?” La plimulto de la inteligenta mondo jam nun trovos tiun ĉi demandon tute superflua; tamen pro konsekvenco ni metas tiun ĉi demandon dank’ al tio, ke ekzistas ankoraŭ multe da homoj, kiuj respondas je tiu ĉi demando per „ne”. La sola motivo, kiun kelkaj el tiuj ĉi homoj elmetas, estas sekvanta: „lingvo internacia detruos la lingvojn naciajn kaj la naciojn.”

Ni konfesas, ke iom ajn ni rompis al ni la kapon, ni neniel povis kompreni, en kio nome konsistis la malfeliĉo de la homaro, se en unu bela tago montriĝus, ke ne ekzistas jam plu nacioj kaj lingvoj naciaj, sed ekzistas nur unu ĉiuhoma familio kun unu ĉiuhoma lingvo. Sed ni supozu, ke tio ĉi efektive estus io terura, kaj ni rapidos trankviligi tiujn ĉi sinjorojn. Lingvo internacia deziras nur doni al la homoj de malsamaj popoloj, kiuj staras unu kontraŭ alia kiel mutuloj, la eblon komprenadi unu alian, sed ĝi neniel intencas enmiksiĝi en la internan vivon de la popoloj. Timi, ke lingvo internacia detruos la lingvojn naciajn, estas tiel same ridinde, kiel ekzemple timi, ke la poŝto, kiu donas al homoj malproksimaj unu de alia la eblon komunikiĝadi, minacas nenigi la buŝajn interparoladojn inter la homoj!

Bruo signifas neniom. Kelkfoje kokino klukas tiel laŭte, kvazaŭ ĝi demetus malgrandan planedon.

JAM NUN SPARU POR LA INTERNACIAJ JUNULARKUNVENOJ!

T.J.O.-KOMUNIKOJ.

Belgujo (Ĉeŝperanto C. Braet, Esscheboomstr. 1, Brugge): El letero de la ĉeŝperanto: „Mi skribis al la belga Ministrejo de l'Publika Instruado (Nacia Servo por la Junularo). Jam ricevis respondon interesan. La direktoro de tiu oficejo skribas, ke li tute simpatias al nia movado. Kaj plue li demandas al mi detalojn pri la venonta internacia junularkunveno (dato, nombro da partoprenontoj, programo, budĝeto, ktp)“.

„Ĉisemajne aperos nia dua TJO-bulteno.“

Ankaŭ mi devas diri al vi, ke la 23an de Nov. 1945a Radiostacio Kortrijk elsendis sufiĉe longan paroladon pri TJO. Ĝi preparolis la jam aperintajn numerojn de „La Juna Vivo“ kaj nia 1^a Bulteno.

Ni petas niajn membrojn: grandnombre sendu dankleterojn al tiu stacio pro la elsendoj! La adreso estas: Belgisch Nationale Radio-Omroep, zender Kortrijk, Rijsselstr. 36, Kortrijk, Belgujo.

Britujo (Ĉeŝperantino F.ino N. Rees, Derwyd, Seven Sisters, Neath, Glam, Wales). Estis kun granda malĝojo, ke la britaj anoj sciigis pri la ekŝigo pro malsano de la angla ĉeŝperanto, S-ro Holland. Angla proverbo diras, ke oni ne rimarkas la akvon ĝis la puto sekigis, kaj estis nur kiam li ĉesis sian laboron por TJO, ke ni plene konsciigis, kiom li faris por nia movado dum la militaj jaroj. Li vere donacis ĉion por la kreskado de TJO en Britujo. Por nur ses pencoj jare aperis dumonata bulteno, eta afero, sed alloga kaj intima; filmservo, librar-servo, gramofondisk-servo, korespondservo. Sed kiu donis ĉion: la filmon, la librojn, la diskojn? Neniu povas imagi ke la sespenca kotizo pagis por ĉio. Ne, ĉi tiuj servoj ebligis nur per la sindona bonkoreco de nia angla ĉeŝperanto. Senĉese li donis, li skribis, li propagandis kontraŭ la tempo kiam li povos prezenti al la estraro de TJO vivantan britan sektion. Sed, bedaŭrinde, en tiu momento li mem devis ekŝigi kaj transdoni la laboron al aliaj.

Granda estas la ŝuldo de ĉiujlandaj TJO-anoj al s-ro Holland, ĉar dum la mallumaj jaroj li tiel zorge flegadis la spiriton de nia movado.

Sed ni ne lasigis solaj, ĉar dum la jaroj venis kelkaj helpemuloj: F.ino Mayne kaj S-ro Beets prizorgas la lernejan sektion de la bulteno, S-ro Rowe la lingvan kaj S-ro Heath la korespondan sekciojn. Ni do kune antaŭen iru al nova epoko! N. Rees.

Nederlando: Estrarkunveno 2/12'45 en Amsterdamo. Ni opiniis unuanime ke diversaj problemoj pri ŝanĝoj en la organizo, kunlaboro kun aliaj organizoj, fariĝos nur aktualaj je la momento, kiam TJO tute regajnis tion, kio perdiĝis pro la milito. „Ni unue fariĝu ni mem.“ La sekretario tamen antaŭpreparos la aferojn. — Financaj rilatoj kun eksterlando: la kasisto serĉas solvon por la pago de alilandanoj. — Propono de la sekr. por ŝanĝi la karakteron de LJV estis ne akceptata; el la opinio de estraranoj kaj leteroj de diverslandanoj montriĝas, ke oni deziras ŝanĝojn, almenaŭ ne la unuan jaron.

La estraro denove akcentis, ke ĝi ne volas esti aro da estroj. La principo de TJO restas: memlaboro kaj komuna respondeco de ĉiuj membroj.

Junularkunveno kaj interŝanĝo de infanoj: S.roj v. Veenendaal, Schut, Bant kaj Meydam prizorgos tion. F. M.

KOMBILO-ENIGMO.

X
X X X X X X X X X X X X X X
X X X X X X X X X X X X X X
X X X X X X X X X X X X X X
X X X X X X X X X X X X X X

Horizontale vi metu la nomon de al ni tre konata internacia Esperanto-organizo.

Vertikale (komencante ĉe la plej maldekstra dento de la kombilo):

1. Meblo. — 2. Subtere vivanta mambesto. — 3. Parenco. — 4. Estas en la buŝo. — 5. Monato. — 6. La malo de tago. — 7. Granda rabobesto. — 8. Rusa monero. — 9. Larvo de papilio. — 10. Mielkolektanta insekto. — 11. Longkrura birdo. — 12. Per kio ni vidas.

Inter la ĝustaj solvintoj ni lotumos belan libron. — Ni akceptos solvojn ĝis 15 februaro. (sendu al: T.J.O.-centro, West-Grafdijk, Ned.).

Ruzeco. Malgranda Johano estis malobeo. Lia patro prenis bastonon kaj diris: „Knabo, ĉu vi scias, kion mi faros?”

„Certe, patro, vi faros promenadon!” respondis Johano kun ruza rideto.

ATENTU!

La legantoj, kiuj ne malmendis la gazeton, ricevos en januaro kvitancon.

Prosperplenan novan jaron deziras al ĉiuj siaj membroj kaj geamikoj „Tutmonda Junularmovado”.

KORESPONDADO.

M. T.-M. en Trépot (Franc) deziras aĝlimon en TJO. *Respondo:* Nia celo ĝuste estas detruĝi ĉiujn murojn inter homoj, rasoj kaj popoloj. Ni do ne rekonstruu murojn aŭ limojn. Tiun aferon solvos la tempo.

Multaj sendis ekz. de Laborista Esperantisto pro la atakoj de la Fed. kontraŭ TJO. *Resp.:* Ni konstruu kaj konstruu kaj ni ne detruu la laboron de aliaj esperantistoj. Estas signo de malforteco!!!

G. en Amsterdamo kaj P. en Barcelono (Hisp): plendas, ke vera arto ankoraŭ ne naskiĝis en la Esperanto-movado. *Resp.:* Havu iom da pacienco. La idealo ankoraŭ ne profunde enradikiĝis en la animo de la esperantistaro. Henr. Roland Holst, konata verkistino en Nederlando skribis en „Socialismo kaj Literaturo”, ke la unuaj soc. verkoj de granda valoro aperis en 1909. Jam en 1848 eldonis Karl Marks la „Komunista Manifesto” n. Kalkulu do mem!!

S.ro M. en P. (Ned) petis mian juĝon pri junularparlamento. Oni pri tio parolis en la Int. Junularkunveno en Londono. — *Resp.:* Mi ne ŝatas viro-parlamenton, nek virin-parlamenton, nek junularparlamenton, sed mi preferas familio-parlamenton. Tio signifas, ke en la parlamento estas viroj, virinoj kaj junularo. Kaj ili ĉiuj, same kiel en la eta familia vivo, kunlaboras en la intereso de la junularo.

J. de G. en K. (Ned) preferas ke ni aranĝu nur kunvenojn kiel antaŭ la milito, t.e. amuzajn. — *Resp.:* Laŭ mi la junularo bezonas gajigajn kaj seriozajn kunvenojn. Ambaŭ ŝajnas al mi necesaj. Vi do aranĝu kunvenojn laŭ via deziro. Espereble mi baldaŭ kiel surprizon trovos programon en mia leterkesto!

Bonvolu skribi, ĉu vi konsentas pri la respondoj. Se ne, sendu al mi pli bonajn solvojn. (Red. „La Juna Vivo” — Limmen).

LA NOVANOJ (Sur la Insuloj Feliĉaj *)

Verkita de Annie Rebers. Ilustrita de Toon Langeberg.

La lego-lernolibreto **La Novanoj** celas doni legaĵon kaj samtempe ripetadon kaj instruadon de la internacia lingvo al gejunuloj; ĝi konsistas el du volumetoj. - La unua libreto „Sur la Insuloj Feliĉaj” pritraktas la ĉiutagan vivon de ses infanoj el simpla familio, loĝanta en la urbeto Telde sur la insulo Gran Kanario en la jaro 1934a. La dua volumeto enhavas la travivaĵojn de la infanoj en Hispanujo en la jaroj 1935a, kaj 1936a. — Ĉiu libreto enhavas kvindek lecionojn. La du volumetoj kune enhavas la tutan gramatikon. — La verketo estas ankaŭ uzebla kiel lernolibreto, sed en la manoj de sperta instruant(in)o. Oni trovos la novajn vortojn kaj gramatikajojn sub la lecionoj.

*) Greklingve: Insulae Fortunatae.

PABLO.



Mi estas Pablo Novano.

Mi estas knabo.

Mi loĝas en la vilaĝo Telde sur la insulo Gran-Kanario.

En la mateno mi iras al la maro. En la maro mi banas kaj naĝas. Post la bano mi manĝas kaj kuŝas en la sablo sub palmo aŭ mi ludas kun Juano kaj Joseo. En la vespero mi iras al Luiza kaj mi manĝas. En la nokto mi dormas sur matraco en la domo aŭ en la herbo sub palmo.

ban-o
la ban-o
dom-o
la dom-o
la herb-o

la insul-o
knab-o
la knab-o
la lecion-o
la mar-o

o

la maten-o
la matraco-o
la nokt-o
palm-o
la palm-o

la sabl-o
la vesper-o
vilaĝ-o
la vilaĝ-o

la =
as

mi ban-as	mi ir-as	mi lud-as
mi dorm-as	mi kuŝ-as	mi manĝ-as
mi est-as	mi loĝ-as	mi naĝ-as
al	kaj	post
aŭ	kun	sub
en	mi	sur

Ekzerco: traduku: al la vilaĝo; sur la domo; sub la matraco; kun Luiza; sur la sablo; en la matraco.

mi banas aŭ mi naĝas; mi ludas aŭ mi dormas; mi kuŝas aŭ mi iras; mi manĝas; mi loĝas.

Gramatika enhavo: la elparolo - la akcento - la literoj c - g - ĝ - s - ŝ - u; la diftongo aŭ;

la nura artikolo: la;


la substantivo: la radiko + la finaĵo o;

la verbo: la radiko + la finaĵo as;

la persona pronomo: mi;

la prepozicioj: al - en - kun - post - sub - sur.

ANITA.



Mi estas Anita Novano.
 Mi **ne** estas knabo. Mi estas knab-**in-o**.
 Pablo estas knabo. Li estas frato de mi.
 Ankaŭ Felipo estas **mia** frato kaj Luiza estas **mia** frat-**in-o**. Ni: Pablo, Felipo, Luiza kaj mi loĝas kun Patro kaj Patr-**in-o** en domo.
 Pablo kaj **lia** amiko Joseo iras al la maro. En la maro ili banas kaj naĝas. En la mateno Patro kaj Felipo iras al la vilaĝoj aŭ al la urbo Les Palmas. En la vespero Felipo kaj **lia** amiko Pio iras al la kino.
 Mi **ne** naĝas en la maro; mi **ne** ludas kun amik-**in-oj** sub la palmoj, ĉar mi estas knab-**in-o**. Knab-**in-oj** ne banas aŭ naĝas en la maro, ili ne iras al la kino. Nur la knaboj.

o		oj		in	
la amik- o	la amik- oj	la amik- in-o	la amik- in-oj		
la frat- o	la frat- oj	la frat- in-o	la frat- in-oj		
la knab- o	la knab- oj	la knab- in-o	la knab- in-oj		
la leon- o	la leon- oj	la leon- in-o	la leon- in-oj		
la patr- o	la patr- oj	la patr- in-o	la patr- in-oj		
la tigr- o	la tigr- oj	la tigr- in-o	la tigr- in-oj		
as					
mi-li-ni-ili banas	mi-li-ni-ili ir- as	mi-li-ni-ili lud- as			
mi-li-ni-ili dorm- as	mi-li-ni-ili kuŝ- as	mi-li-ni-ili manĝ- as			
mi-li-ni-ili est- as	mi-li-ni-ili loĝ- as	mi-li-ni-ili naĝ- as			
ne =					
ankaŭ	de ili = ilia	ni		la kin- oj	
ĉar	li	de ni = nia		urb- o	
de	de li = lia	kin- o		la urb- o	
ili	de mi = de mia	la kin- o		la urb- oj	

Ekzerco: metu en la pluralon; matraco; urbo; nokto; maro; domo; vespero; insulo; vilaĝo; leciono.

Ekzerco: metu en la negativan formon: Mi iras al la vilaĝo. Ni loĝas sur insulo. Li kuŝas en la sablo. Pablo kaj Joseo iras al la urbo. Ili estas amikoj. Luiza kaj mi estas frat-**in-oj**.

Gramatika enhavo: la litero ĉ;
 la substantivo: oj; la verbo: as;
 la personaj pronomoj: li-ni-ili;
 la posedaj pronomoj: mia-lia-nia-ilia;
 la sufikso: in; la prepozicio: de
 la nea prepozicio (atentu la lokon!): ne; ripetado: al-en-kun-sub-sur.

INTERNACIAJ JUNULAR-KUNVENOJ.

Pri la „junular-interŝanĝo” ni jam skribis en la antaŭa numero. Jam anoncis sin kelkaj ned. junulargrupoj. Sed estas necese, ke sama nombro da danaj grupoj partoprenos. Espereble la esp. grupoj en Nederlando forte subtenos nian laboron, kaj jam nun pripensu kaj priparolu, ĉu ili en 1946 povos gastloĝigi danajn gejunulojn dum 12—14 tagoj, por ke ni havu certecon pri la sukceso de ĉi tiu entrepreno. Ankaŭ necesas, ke la junuloj jam nun studu teatraĵetojn, kantojn, ktp., por aranĝi festetojn en ĉiuj „verdaj” vilaĝoj, kie venos eksterlandaj grupoj.

La internacia kunveno por la pli aĝa junularo kaj gvidantoj verŝajne okazos ĉe la marbordo en Belgujo. Niaj anglaj amikoj estis pretaj aranĝi ĝin en Birmingham aŭ en Londono, sed la ŝipveturo al Anglujo kostas por la nederlandanoj pr. 100 guld. Por la belgoj pr. 45 guld. Ne eblas en 1946 pagi tiom grandan sumon. Espereble en 1947 la situacio estos pli bona, kaj tiam ni ĉiuj partoprenu en la granda TJO-kunveno en Anglujo! La internacian kunvenon en Belgujo aranĝos Floor Meydam, Owenstr. 59, Leerdam (Ned.).

KONSTANTA PROPAGANDISTO POR „ESPERANTO EN LA LERNEJO”.

Anoncis sin juna, energia knabo por daŭre propagandi por Esperanto en la lernejoj. Li intencas prezenti la filmojn pri niaj internaciaj kunvenoj en Groet kaj Tervuren, precipe en gepatraj kunvenoj, sed ankaŭ en esperanto — kaj junularkunvenoj. ktp. — Por tiu grava laboro ni urĝe bezonas la helpon de ĉiuj esperantistoj. Ili gastloĝigu nian propagandiston kaj aranĝu la kunvenojn, por ke ni ŝparu tempon kaj monon.

Ankorŭ mankas al ni 8-mm. filmaparato. Kiu amiko savas nin el tiu malfacilaĵo? Skribu baldaŭ al la red. de „La Juna Vivo” en Limmen. La afero urĝas!!!

KOMUNIKOJ PRI „LA JUNA VIVO”.

Finfine ni de la registaro ricevis permeson kaj ankaŭ paperon por eldoni „La Juna Vivo”. Ĝi do nun ĉiumonate aperos 12-paĝa.

Multe ni dankas la presiston (TJO-anon), kiu helpis nin dum ĉi tiuj malfacilaj monatoj.

Ĉiumonate ni enpresigos du lecionojn. Estas sufiĉe da materialo por komencantoj. Espereble nun ĉiu gvidanto grupe abonos „La Juna Vivo” kaj per tiu ago forte subtenos la junularlaboron.

Donu al ni adresojn, kaj ni sendos specimemon!!!

EN LA LERNEJO.

„Johaneto, kial vi ĉiam malfruas?”

„..... pro la tabulo!”

„Kia tabulo?”

„Tiu, ĉe la komenco de la strato, kiu indikas: Lernejo, malrapide!”

KORESPONDADRESOJ.

Britujo: S.ro J. White, 212 Princess Road. Manchester 14, dez. kor.

S.ro Raymond G. Richardson, BM/GRAN, London W.C. 1 (maturaĝo) ŝatus korespondi kun ĉiuaĝaj knaboj.

S.ro G. Dickinson, 28 Ruskin St., Liverpool 4, 32-jara, serĉas amikinojn por korespondi.

Joy Hartley Bolton, St. Dulhus, 41, South Court Av., Dorchester, Dorset, 10-jara, dez. kor. kun knabino.

Peter E. J. Littledale, „avalon”, Dowlans Rd., Gr. Bookham, Syrru, 16-jara skolto, interŝ. florojn sovaĝajn, esp. librojn kaj gazetojn.

John E. Hooper, III Trinity Rd., Edinburgh, Skotlando, 15-jara studento, interesiĝas pri radio, popolmuziko kaj libroj.

P. J. Armstrong, 10 Fourth St., Bowhill, Gardenden Fife, Skotlando, 18-jara mineja laboristo, dez. kor. Interesiĝas pri biciklado, aeronautiko.

Mi bezonas 14 adresojn de knaboj, kiuj volas korespondi kun anglaj knaboj en mia klaso. Adr: A. G. Batt, 4, Queens Rd., Colchester, Essex.

Mi dez. kor. kun samideanoj en Nederlando pri ĝeneralaj temoj. Mi estas 18-jara junulo, kaj laboras en karbminejo. Adr: Roy Sands, Willowdene, Barnoldby Rd., Waltham, Grimsby.

Francujo: Ŝatantoj de porinfana literaturo bonvolu sendi rakontojn, historiojn, fablojn, al: Esperanto, Arras, P.d.C.

Fino S. Josseaux, 11, Allee de la Prevoyance, Reims, Marne, dez. adresojn: 1e de gejunuloj, kiuj dez. kor. kun 19-jara junular-gastejanino; 2e de esp. skoltoj, kiuj dez. kor. kun 14-jara franca skolto.

Kiuj instruistoj dez. interŝ. mallongajn taskojn, poŝtmarkojn; poŝtkartojn, insektojn, florojn, semerojn, minaĵojn, desegnojn, albumojn, kun miaj lernantoj 11-14-jaraj. Mi tradukas la esp. leterojn kaj disdonas ilin al francaj instruistoj. El tiuj interŝanĝoj mi atendas gravajn rezultatojn ne nur rilate pedagogion, sed ankaŭ rilate pacon kaj esperanton. Adreso: Lentaigne, Instruisto, Balaruc Les Bains (Herault).

Mademoiselle Lucienne Metge, Prof. Collège de Paul Han, Paulhan, Aveyron, serĉas korespondantojn por siaj gelernantoj.

Finnlando: S.ro Reino Sarin, Huovintie /as/ dez. kor.

S.ro Viljo Pünni Stora Langgat. 60, Vasa, dez. kor., 28-jara .

S.ro Väinü Wilkman, Kytälänkatu 15, as., 4 Tampere, 40-jara pentristo, ne edziĝinta, dez. kor.

Islando: S.ro Börge Lemming, Laugaráši, Biskupstunga, dez. interĉ. poŝtmarkojn kun kolektantoj de la tuta mondo.

Irlando: S.ro P. Harding, Grange of Mallusk, Carnmoney, Co Antrum, dez. kor.

Italujo: Torina Esperanto-Grupo, Casilla Postale 161, Torino, serĉ. kor.

Nederlando: S.ro A. W. Withoos, Venkelstr. 15, Eindhoven, interŝ. Esp. gazetojn, ekslibrisojn, poŝtmarkojn.

S.ro T. Vrielink, Schagerbrug F 111 (NH), dez. por siaj gelernantoj (9-15-jaraj) samaĝajn korespondantojn en div. landoj. Kor. per il. poŝt. Gvidantoj de infankursoj bonvolu skribi unue al li.

S.ro D. Bakker, Nic. Beetsweg 152, Heiloo, dez. por siaj kursanoj (13-15-jaraj) gekorespondantojn.

S.ro de Regt, Eendrachtsweg 36B, Rotterdam, serĉas gekorespondantojn por siaj 13-15 jaraj gelernantoj.

26-jara dekoraciartisto dez. kor. pri aplikitaj artoj (vitro, fajenco, teksaĵoj, metalo, ktp). F. Meydam, Owenstr. 59, Leerdam.

Svisujo: S.ro Hans Hermann, Utenhausen b. Andorf, 19-jara librovendisto, dez. kor. Ĉiam resp.

Julio Gilliard, Collège 140, Neuveville, J. B. dez. kor. prefere kun fraŭlo; speciale interesas skulptarto. Partoprenas en porpacaj „naturistaj kaj vegetaranaj movadoj.

Svedujo: S.ro Lizz Nilsson, Södra Vägen, 34, Varberg, dez. kor. (21-jara). Karl Erik Karlsson, Upplandsgatan 69¹, Stockholm, peras adresojn.

Esperanto en la radio.

Esperanto en la radio. Ĉiulunde, 22.20—22.30 Praha I (260 kaj 1571 m). Informoj. — Ĉiuĵaŭde, 22.20—22.30 Praha I (260 kaj 1571 m): Informoj. — Aŭskultu kaj nepre skribu al Esperanto-Asocio, Praha 47, Ĉeĥoslovakujo. — En 1932 estis pr. 2500 radiodisaŭdigoj. Antaŭ la milito pr. 1200 disaŭdigoj. Nun ankoraŭ kelkaj semajne. Ni faru nian eblon por reakiri la perditan gravan propagandteronon-

Ricevitaj esperantatoj.

Ricevitaj esperantatoj: Jarlibroj de la Internancia Esperanto-Ligo 1945, sendataj nur al individuaj membroj de IEL. Kotizoj: Membro kun jarlibro: f 2,50 (40 b. fr.; 40 fr. fr.; 3,50 sv. kr.; 4 sv. fr.). Membro-Abonanto: f 5,00 (100 b. fr.; 9 sv. kr.; 9 sv. fr.). Informoj ĉe Centra Oficejo de I.E.L., Heronsgate, Rickmansworth (Herts), Anglujo.

„Pensoj de Zamenhof“ en Esperanto kaj en la franca, angla, germana kaj itala lingvoj. — Tiu beleta verketo enhavas krom la enkondukon 24 sentencojn de Zamenhof. La ĉefa penso okupiĝas pri la problemo: kiel oni povas krei daŭran pacon por la homaro? Prezo 1 sv. fr. aŭ 0,65 guld. Mendu ĝin al: Svisa Int. Servo, Hallenstr. 16, Bern Svisujo, aŭ ĉe TJO-Centro, West-Grafdijk (Ned.).

„La Preĝo de Nia Sinjoro“, de Henry Thomas Hamblin. Prezo 6 pencoj. Mendebla ĉe Brit. Esp. Asocio, 140 Holland Park Avenue, London, W II.

„Esperanto, de tweede taal voor ieder.“ (Esperanto, la dua lingvo por ĉiu-). Vere bela kaj plaĉaspekta afiŝeto, trikolora (22 × 23,5 cm) por pendigi ĉe fenestro. Prezo 4 belg. fr. aŭ unu int. respondkupono. Eld. Flandra Esperanto-Instituto, P. v. Humbeekstr. 3, Brusel-W.

Cirkuleron de T.A.G.E. kun urĝa peto al la geinstruistoj por refondi la tutmondan instruistan asocion. Skribu tuj al P. Korte, Schoolstr. 13, Veenendam (Ned.).

Mond jamboreo.

La venonta Mond-jamboreo de la skolta movado okazos en Francujo en aŭgusto 1947. Esperanto estos unu el la lingvoj uzataj, same ĉiuj prospektaj estos tradukataj en Esperanton.

KIEN SENDI LA JARKOTIZON POR TJO KAJ LJV?

	TJO	IJV
Belgujo: C. Braet, Esscheboomstr. 1, Brugge, ĝiro 4770.86	40 fr.	24 fr.
Britujo: F.ino Rees, „Derwydd”, Seven Sisters, Neath, Glam. Wales	4 ŝil.	§ 2/6
Danujo: C. Jensen, Musikhuset, Nykøbing, F.	5 kr.	3 kr.
Finlando: Svante Kivinen, Vipurinlääni, Kouvola ...	125 kr.	75 kr.
Francujo: S.ino Turin, Instruistino, Trépot, Doubs.	100 fr.	60 fr.
Maroko: S.ino I. Fink, 5 rue de Savorgnan de Brazz, Casablanca	50 fr.	30 fr.
Nederlando: TJO-Centro, West-Grafdijk, ĝiro 382363	f 2,50	f 1,50
Portugalujo: A. P. da Silva, Quinta do Ferro, Rua B. No. 28—20 Dto, Lisbono	25 esk.	15 esk.
Norvegujo: Norv. Esp. Ligo, Box 942, Oslo	4 kr.	2,4 kr.
Svedujo: Eld. Soc. Esperanto, Fako 19071, Stockholm	4 kr.	2½ kr.
Svisujo: Kobelt, Thalerstr. 340, Rheineck	4 fr.	2½ fr.

Tiujn, kiuj ankoraŭ ne pagis sian kotzion, ni urĝe petas: Faru tion baldaŭ—Oni ofte plendas pri alta kotizo por junaj infanoj, tamen ni atentigas, ke la aspirant-anoj pagas nur 80 %. Cetere, en lokoj, kie estas TJO-grupo, oni enkasigu la kotizon semajne, aŭ monate.

„**Nia Trezorejo**”. Jenajn donacojn ni ricevis por TJO kaj LJV: Fam. K.: f 3,50; F.ino L.: f 7,50; B.: f 1; L. S.: f 7,50, ĉiuj en A'dam; S.ino O. W. en Abbekerk: f 9; H. en Amersfoort: f 1,50; J. en St. Annaparochie: f 5; W. en Berlikum: f 2,50; K. W. en Beverwijk: f 2,50; N. en de Bildt: f 2,50; F.ino B. en Bussum: f 1; S. en Enkhuizen: f 18,50; v. d. M. en Eindhoven: f 12,50; S. en Geldermalsen: f 3; D. H. en Giekerk: f 12,50; P. R.: f 8; S.ino P.—R.: f 17,50 (ambaŭ en Gouda); Esp. Grupo en Groet: f 20; M.: f 5; B.: f 2,50 (ambaŭ en Groningen); F.ino B. en Haarlem: f 5; S. de G.: f 4,50; H. H.: f 2,50; D. B.: f 2,50 (ĉiuj en Heiloo); K. en Hoogezand: f 0,50; Fam. v. E. en Langereis: f 10; A. P. en Leeuwarden: f 7,50; F.ino W. en Lunteren: f 2,50; Fam. L.: f 3,50; F.ino L.: f 7,50; F.ino A.: f 2 (ĉiuj en Purmerend); S. en Putten: f 6,50; R'damaj Esperantistoj: f 30,50; R'damano: f 2,50; T. en Roordahuizum: f 7,50; P. de G. en Schagerwaard: f 0,50; F.ino N. T. en Stompetoren: f 0,50; B.: f 10, F.ino S.: f 3 (Texel); M. en U.: f 20,60; E. en Voorhout: f 1,50; Esp. grupo en W. Grafdijk: f 9,76; S.ino N. en Wernhout: f 7,50; de V. en Wieuwerd.: f 2; A. en Wormerveer: f 3,50; Ges. roj S. en Wijdenes: f 5; V. en Zaandam: f 2,50; S.ino L.—S.: f 3,50 en A'dam. Entute f 307,86.

Esperable sekvas ankoraŭ multaj donacoj, ĉar la restarigo de TJO kostas multegan monon. Granda malfacilaĵo ja estas, ke ni ne povas ricevi monon el la aliaj landoj. Nur per forta helpo ni sukcesos daŭre eldoni „LJV” 12-paĝa. Do — subtenu TJO!!!